

ESPERO KATOLIKA

Societo por la vastigado de l'lingvo Esperanto inter la katolikoj

FONDINTO-DIREKTORO : Abato Em. PELTIER
en CHEILLÉ, per AZAY-LE-RIDEAU
(Indre-et-Loire) FRANCUJO

Jara kotizaĵo por E. K.... 2 fr. »
JARA ABONKOSTO POR LA REVUO :
En Francujo..... 1 fr. »
En eksterfrancaj landoj.... 1 fr. 50

REGULARO

REGULO 1^a. — La Societo « Espero Katolika », fondita en decembre 1902, havas la celon vastigi en la mondo katolika, per ĉiuj rimedoj eblaj kaj legaj, la idiomon kreitan de Doktoro Zamenhof, sub la nomo *Esperanto*.

Ĝi penados atingi tiun ĉi celon per la produktado kaj dissendado de ĉiuj katolikaj verkoj en Esperanto. Ĝi organizos ĉie, kie ĝi povos, paraladojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto, en la katolikaj universitatoj, lernejoj, seminarioj, k. t. p.

REGULO 2^a. — Por ĝi ano de l'E. K. sufiĉas esti katolika, kaj pagi sian kotizaĵon. La minimumo de l'jara kotizaĵo estas 2 frankoj, la maksimumo senlima. Ĉiu donacinta unufoje 100 frankojn ricevos la titolon « Bonfaranto ».

REGULO 3^a. — Da Societanoj estas kvar kategorioj :

- a) *Aprobantoj*, kiuj ne lernas Esperanton, sed nian entreprenon aprobas kaj helpas per sia kotizaĵo ;
- b) *Adeptoj*, kiuj lernas Esperanton ;
- c) *Fervoruloj*, kiuj varbis dek aprobantojn aŭ kvin adeptojn ;
- d) *Elektistoj*.

REGULO 4^a. — Estas elektistoj almenaŭ sep el la adeptoj francaj.

Ili estos nomataj de l'Fondinto-Direktoro, aŭ de liaj posteuloj. — Ili devas :

- a) Elekti la Prezidanton, Vic-Prezidanton, Sekretarion de l'elektistaro ;
- b) Elekti la posteulojn de l'Fondinto-Direktoro.

REGULO 5^a. — La Direktoro regas la Societon sub sia respondeco persona, per si mem aŭ per rajtigitoj. — Nur franco povas esti direktoro.

REGULO 6^a. — La sidejo de l'Societo estas en la domo de l'Direktoro, aŭ en alia loko difinita de li.

REGULO 7^a. — Kiam estos eble, folio aŭ revuo informos la membrojn de l'E. K. pri la regado, pri l'administrado, pri la rezultatoj ricevitaj. Oni ankaŭ publikigos kronikon kaj la plej bonajn artikolojn verkitajn de anoĵ de l'*Espero Katolika*.

REGULO 8^a. — La daŭro de l'Societo estas senlima. Ĝin povos disigi nur voĉdono de tri kvaronoj de l'membroj. En okazo de disigo, la tuta havo de l'Societo apartenos al la Sankta Patro.

STATUTS

ARTICLE PREMIER. — La Société « *Espero Katolika* », fondée en décembre 1902, a pour but de répandre dans le monde catholique, par tous les moyens possibles et légaux, l'idiome créé par le docteur Zamenhof, sous le nom d'*Esperanto*.

Elle s'efforcera d'atteindre ce but par la production et la diffusion d'ouvrages catholiques de toutes sortes en Esperanto. Elle organisera, partout où elle le pourra, des conférences, des réunions, des cours sur l'Esperanto, dans les universités et collèges catholiques, dans les séminaires, etc.

ART. 2. — Pour devenir membre de l'*Espero Katolika*, il suffit d'être catholique et de payer sa cotisation. Le minimum de la cotisation annuelle est de 2 francs, le maximum sans limite. Toute personne ayant fait un don de 100 francs recevra le titre de « Bienfaiteur ».

ART. 3. — Il y a quatre catégories de sociétaires :

- a) Des *Approbateurs*, qui n'apprennent pas l'Esperanto ;
- b) Des *Adeptes*, qui apprennent l'Esperanto ;
- c) Des *Zéloteurs*, qui ont recruté dix approbateurs ou cinq adeptes ;
- d) Des *Électeurs*.

ART. 4. — Sont électeurs au moins sept des adeptes français. Ils sont nommés par le Fondateur-Directeur ou par ses successeurs.

- a) Elire le Président, le Vice-Président, et le Secrétaire du corps électoral ;
- b) Elire le successeur du Fondateur-Directeur.

ART. 5. — Le Directeur gouverne la Société sous sa responsabilité personnelle, par lui-même ou par des fondés de pouvoir. Nul ne peut être directeur s'il n'est Français.

ART. 6. — Le siège de la Société est dans la demeure du Directeur ou dans tout autre lieu désigné par lui.

ART. 7. — Quand la chose sera possible, une feuille ou revue ren-

seignera les membres de la E. K. sur le gouvernement et l'administration de la Société et sur les résultats obtenus. On publiera également une chronique et les meilleurs articles composés par les membres de l'*Espero Katolika*.

ART. 8. — La durée de la Société est illimitée. Elle ne pourra être dissoute que par un vote des trois quarts de ses membres. En cas de dissolution, tout l'avoir de la Société appartiendra au Saint-Père.

KIAL KATOLIKA SOCIETO ESPERANTISTA ?

Esperanto estas idiomo neŭtrala. Ĉiu homo povas ĝin uzi laŭ siaj deziroj. Oni povas ĝin ŝati kiel rimedo interŝanĝi ilustritajn poŝtajn kartoĵojn aŭ kolektadi poŝtmarkojn. Sed ni, kalolikoj, povas konsideri Esperanton kiel mirinda rimedo por faciligi rilatojn kun niaj alilandaj fratoj kaj por realigi la vorton de Nia Sinjoro : « unum ovile et unus pastor », « unu ŝafaro kaj unu paŝtanta », (Johan. x. 16.). Tiu ĉi granda ideo alkondukis nin al la fondo de l'*Espero Katolika*.

Ni baldaŭ pli longe parolis pri la utileco de Esperanto por la katolikoj.

Sed ni volas tuj publikigi france kaj Esperante leteron de Lia Ĉefepiskopo Moŝto René-François Renou, kies juĝon ni humile petis.

CHER MONSIEUR LE CURÉ.

Vous soumettez à mon appréciation une entreprise ayant pour but d'unir les catholiques de toutes nations par le moyen de la langue auxiliaire internationale, dite Esperanto.

J'approuve bien volontiers ce projet qui me semble favoriser la diffusion de l'Evangile et le rapprochement des peuples.

Tours, le 6 décembre 1902.

Signé : † René FRANÇOIS,
Archevêque de Tours.

KARA SINJOR' PAROĤESTRO,

Vi metas sub mia juĝon entreprenon kiu celas unuigi la ĉiunaciajn kalolikojn per la internacia lingvo helpanta, nomata « Esperanto ».

Mi tre volonte aprobas tiun ĉi projekton, kiu al mi ŝajnas favori la vastigadon de l'Evangelio kaj interproksimiĝon de l'popoloj.

Tours, 6^{an} de decembro 1902.

Subskribis : † René FRANÇOIS,
Cefepiskopo en Tours.

NIA ORGANO

Laŭ konsento kun la direkcio de *L'Aube*, tiu ĉi revuo de nun estos oficiala organo de l'Espero KATOLIKA.

Ĉiu kotizanta 3 f. por E. K. (3,50 en eksterfrancaj landoj) ricevos *L'Aube* ĉiumonate, esceptinte aŭguston kaj septembron.

La membroj de Societo S. B. kaj ĉiu aboninta revuon *L'Aube* kotizos nur 0 f. 50 por E. K.

Ĉion pri la abonoj kaj pri la redakcio oni sendu al S^o-Abato EM. PELTIER, en *Cheillé per Azay-le-Rideau, Ind.-et-Loire, FRANCULO*.

(Les membres de la Société S.-B. et tous ceux qui sont abonnés à la revue *L'Aube* ne paieront qu'une cotisation de 0,50 à la E. K.)

KRONIKO

Laŭ la Rugulo 7^a, ni ĉiumonate publikigos kronikon pri la progreso de l'*E. K.*; kaj ankaŭ, — kiam ni havos korespondantojn en ĉiu fremda lando, — pri la ĉiea vivado katolika, pri la movado de l'ideoj religiaj, pri la plej bonaj libroj verkita de katolikoj fremdaj aŭ francaj.

Vortaro pri religiaj demandoj.

Por krei kaj konigi la vortaron necesan al la esprimo de l'ideoj religiaj, ni publikigos verketojn, ĉu originalajn tekstojn, ĉu tradukojn de l'ekleziaj preĝoj. Ni plezure ricevos la verkojn de niaj aliĝantoj kaj publikigos la plej bonajn da ili.

Ni volas doni la honoran lokon al la Preĝo de l'Sinjoro.

Patro Nia.

Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu via nomo, venu regĝo via, estu volo via, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Pانون nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ, kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn, kiel ni aŭkaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj, kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen. (*Tradukis D^o ZAMENHOF.*)

BIBLIOGRAPHIE

Grammaire et Exercices de la langue internationale Esperanto, par L. de Beaufront. — Prix: 1 fr. 50.

Dictionnaire Esperanto Français, par le même. — Prix: 1 fr. 50.

L'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et M. Pagnier. — Prix: 0 fr. 75. (Ces trois ouvrages sont édités par la librairie Hachette, 79, boulevard Saint-Germain, Paris.)

Pregareto por Katolikoj (Petit Recueil de prières pour catholiques), par L. de Beaufront. — Prix: 0 fr. 50. Paris, Poussielgue, rue Cassette, 15.

ESPERO KATOLIKA

Société pour la vulgarisation de l'ingvo Esperanto inter la katolikoj

FONDINTO-DIREKTORO : Abato Em. PELTIER	Jara kotizaĵo por E. K....	2 fr. »
en CHEILLÉ, per AZAY-LE-RIDEAU	ABONKOSTO JARA POR LA REVUO :	
(Indre-et-Loire) FRANCULO	En Francujo.....	1 fr. »
	En eksterfrancaj landoj....	1 fr. 50

Utileco de Esperanto por Katolikoj

Estas certe speciala utileco de Esperanto por la katolikaj komercistoj, vojaĝantoj. Librovendistoj, por ĉiuj, kiuj verkas pri la diversaj sciencoj, pri filozofio, historio, literaturo, eksegso, teologio, pri socialaj demandoj, k. t. p.

Pri tio ĉi mi ne intencas hodiaŭ paroli, sed nur pri la ĝenerala utileco de Esperanto por la katolikaro.

Milionoj da homoj havas saman kredon, obeas saman Patron, antaŭ sama tablo ricevas la Korpon de Nia Sinjoro Jesu-Kristo, kaj inter ili unu ne komprenas la alian.

Monahoj, monahinoj, dispelitaj de l'obeo aŭ persekuto sur la kvin partojn de l'mondo, nenion povas komuniki al la plej multaj el siaj fratoj aŭ fratinoj.

Misiistoj, sur sama fremda lando, povas apenaŭ sin reciproke saluti per kelkaj latinaj vortoj *skribitaj* (ĉar la elparolado de l'lingvo latina ĉe la diversaj popoloj) multe diferencas. Ili instruas infanojn, kiuj, fariĝinte kristanoj, daŭrigas restadi, de unu lando al alia, malmikoj, tial ke ili estis instruitaj laŭ malsamaj lingvoj.

La orientaj eklezioj ne tian saman lingvon parolas, kian la okcidentaj. Ilia literaturo nur malfacile ni povas koni, kaj ili la nian.

Se, en ia nacio, eminenta homo verkis libron utilan, nur la homoj de tiu ĉi nacio povas ĝin legi; la ceteraj atendas tradukon en sia lingvo, jen tro malfrue, jen neniam farotan. Kaj tamen, kiom da libroj ne interesas nur la nacion, en kiu ili eldoniĝis: kiom da literaturaĵoj, da sciencaj, filozofiaj, religiaj verkoj estus utilaj al la tuta mondo!

Pro malsamaj kaj malbonaj legoj, en ĉiuj landoj, laboristoj suferas. Eble nur internaciaj legoj, konformaj al la instruoj de Jesu-Kristo, ĉesigus tiujn suferojn. Sed tiaj legoj ne povas esti faritaj, ĝis la diversaj nacioj idiomon komunan havas por agado interkonsentata.

Kia utilo por ĉiuj pastraroj, kia forto por la tuta eklezio, kia bono por ĉiuj animoj, se ĉiuj kristanoj, de unu lando al alia, sin komprenus reciproke; se ĉiuj gemonahoj, gemisiistoj instruadus ĉiujn infanojn per sama facilega lingvo, se la bonaj libroj, ĵus verkitaj de katolikoj eminentaj tuj estus tradukitaj en sama idiomio; se la diversnaciaj anoj de societoj pacigaj aŭ civilizaj povus korespondadi per lingvo neŭtrala, de ĉiuj akceptita!

Nu! ekzistas tia lingvo: ĝin kreis antaŭ dudek jaroj Doktoro Zamenhof, sub la nomo « Esperanto »; ĝin parolas jam miloj da homoj; pli multaj ankoraŭ en ĝi povas verki. Kial do ni, katolikoj, ĝin ne uzus por venigi la regecon de Dio, kaj efektivigi la volon de nia Sinjoro:

Unu ŝafaro sub unu Paŝanta
Ĉiujna popolojn en si enhavanta,
Unu kristana ĉiueklezio!...

(P. A. DOMBROWSKI).

La ideoj kondukas la mondon. La *rapida* disvastigo de l'ideoj estas do io alte grava. Oni ne saĝe agus ne interesiĝante pri ĉio, kio povas esti rimedo por pli rapide disvastigi la ideojn; ĉar laŭ tio, se la rimedo estos uzata por bona aŭ malbona celo, gravaj devenos sociaj kaj moralaj sekvoj.

Kial ni, katolikoj, estas tiel ŝanceliĝemaj uzi ĉiun novan rimedon agadi, kiun al ni liveras progresado? Ni ordinare ekmarŝas, kiam niaj kontraŭuloj jam de longe nin antaŭiris sur la vojo...

Ĉu tio ankoraŭ alvenos pri l'uzo de l'lingvo internacia?

Lingvo, kiu povas esti *legata*, *parolata* kaj *skribata* post lernado da du aŭ tri monatoj, sendube liveras mirindan kaj potencon rimedon por la disvastigo de l'ideoj tra la mondo.

Komprenante la gravecon de l'afero, kion do devas fari la katolikoj? Ili devas kiel eble, plej rapide eklerni Esperanton; — pri ĝi instrui la studentojn en iliaj lernejoj kaj universitatoj; — kaj klopodi por la produktado de katolikaj verkoj esperantaj.

Per Esperanto, hebreoj, protestantoj, framasonoj povas unuiĝi. Ni *unuaj* komencu. Jen ni fondis societon por helpo reciproka, por instruadi la plej multajn pri la lingvo internacia, por unuiĝi per ĝi ĉiujn katolikojn en la mondo kaj ankaŭ vastigi la plej bonajn katolikajn verkojn.

Ni penados varbi korespondantojn, delegitojn kaj fondi klubojn

almenaŭ en ĉiuj episkopurboj. Tial ni povas publikigi kronikon pri la movado de l'ideoj religiaj kaj pri la ĉiea vivado de la katolikaro.

Antaŭen do, katolikoj! Venu, unuigu kun ni kiel eble, plej nombraj! Abato Em. PELTIER.

KRONIKO

Jen kelkaj leteroj el nia kuriero:

Parizo. — 7^{an} de jan. — « Jam de longe mi provis disvastigi nian lingvon inter miaj sampartianoj, sed preskaŭ tute vane; *kaj mi tre bedaŭras, ke* nur niaj politikaj kontraŭuloj sin interesas pri Esperanto, kio post ne longa tempo kaŭzos « akaparon » de E. de tiuj sinjoroj kiuj ankoraŭ kulpigos nin pri « reagemo ». — P. F.

Douai. — 12^{an} de jan. « Kun ĝojo mi aliĝas al via entrepreno kaj faros tion, kion mi povos por varbi aliajn membrojn ». — P. B.

Vrsce (Bohemujo). — 10^{an} de jan. « La penso krei societon por unuiĝi la katolikojn de ĉiuj nacioj per helpo de Esperanto estas tre bona. Ni laboru kaj esperu! » — K. F. pastro katolika.

Bystrice-Hostyn (Moravujo-Austrujo). — Jan. « Preskaŭ la plimultaĵo da katolikoj en nia lando eĉ ne scias pri Esperanto... Kiel fortaj povus esti katolikoj de ĉiuj nacioj se ili havus centran societon kaj gazeton! » — A. B., helpanto meblista.

Charbonnières (Rhône). — 18^{an} de jan.: « Min tre interesas la esperantista afero. Mi estos tre feliĉa, se mi povos esti utila al vi. » — A. H., kuracisto.

Peterburgo (Rusujo). — 23^{an} de jan.: « Vian Regularon mi ricevis kaj kun granda ĝojo legis ĝin. Mi plene aprobas vian E. K. kaj volonte fariĝas ĝia membro. » — P. A. D.

Louvain (Belgujo). — 2^{an} de febr.: « Miaj amikoj kaj mi multe surprizitaj estis pri la peno, kiun vi provas. Sed ĉar via Ĉefepiskopo vin aprobas, ni ankaŭ aprobas vin. Ni serioze intencas vin helpi... » — P. M.

Louvain. — 8^{an} de febr.: « Ni grande ĝojis pri la informoj, kiujn vi sendis al ni; tial nian tutkoran apogon vi povas esperi por tiu ĉi movado. Sed en la komenco malfacilaĵoj troviĝos sur la vojo. » — P. B.

Givry (S.-et-L.). — 8^{an} de febr.: « Vivu la Societo « Esperanto » kato-
likaj » kaj sia oficiala organo! Mi mem en la komenco kareseme tiun ĉi belegan ideon havis... Mi vidas kun granda plezuro ke ĝi nun korpigas kaj multe esperas pri ĝia estonteco! » — Abato I. F.

Granda Seminario en A. — « Mi estas konvinkita ke Esperanto estas tre ŝatinda progreso. Tial mi deziras scii en kia mezuro mi povas interesiĝi kaj precipe esti utila je via projekto... Jen estas mi, kun la tuta sindonemo, kiun kapablas profesoro de Granda Seminario por kunfratol » — Abato J. M. G.

Besançon. — « Sufiĉaj ŝparoj al mi permesas doni cent frankojn, laŭ formoj leĝaj, por la celo proponita de la Regularo. Mi vin petas akcepti... Mi serĉas unuigi mian penadon je grandaj entreprenoj. » — X.

Bordeaux. — 20^{an} de febr.: ... Ĉiunaciaj katolikoj sin sentus pli unuigitaj, se ili povus siajn librojn rekte legi, sen esti devigitaj uzi tradukon, ofte jugata ne utila, aliffoje ne ebla, ĉiam ne perfekta. » — R. D. utileco troviĝus por la bultenoj aŭ revuoj historiaj aŭ sciencaj. » — R. D.

Parizo. — 26^{an} de febr.: « Tia unuigo (per Esperanto) estos sendube la komenco de l'mirinda unuigo, dank'al kiu la popoloj de l'tutmondo espereble fariĝos « unu ŝafaro kaj unu paŝtanta »... Permesu ke mi vin danku kaj gratulu el mia tuta koro. » — Doktoro G. F.

Ni ankoraŭ ricevis leterojn de Kanado, de Hispanujo, de Anglujo, de Aŭstrujo, k. t. p. Ni ne povas ĉiujn eldoni. La supre donitaj informoj sufiĉos montri, ke la E. K. estis iamaniere atendita kaj dezirita de l'katolikaj esperantistoj. Koran dankon al ĉiuj niaj korespondantoj. Estu ili, nun, fervoraj propagandistoj de nia afero kaj, kun helpo de Dio, ĝi sukcesos.

L'ESPERANTISTE, la nelacigebla organo de la S. p. p. E., tre afable prezentis la E. K. je siaj legantoj, en sia februara numero. La francajn esperantistojn ni speciale konsilas aliĝi al la S. p. p. E., kaj ricevi ĝian utilegan revuon, kiu estas eldonita parte france kaj esperante. (Oni devas sin turni al S^o Bréon, sekretario de la S. p. p. E., 6, rue du Levant, Vincennes).

AVIZO GRAVA

De nun, la revuo estos sendata al la *solaj abonintoj*. Ni do petas niajn legantojn kaj amikojn *sendi al ni ilian aliĝon* al la *Espero* Katolika, kune kun la abonpago al la revuo kaj la jara kotizaĵo, *por al ni kaj al ili eviti elspezojn kaŭzotajn de posta kvitanco*. Post-markoj *nur francaj* estos akceptataj por pago. Internacia post-mandato estas la plej facila rimedo sendi monon de eksterfrancaj landoj. *Ĉiuj abonitoj kaj kotizaĵoj estos akceptataj de la 1 de Marto*.

APRIL - MAJO

ESPERO KATOLIKA

Societo por la vastigado de l'lingvo Esperanto inter la katolikoj

FONDIRTO-DIREKTORO : Abato Em. PELTIER	Jara kotizaĵo por E. K.	2 fr. »
en CHEILLÉ, per AAV-LE-RIDEAU	ABONKOSTO JARA POR LA REVUO :	
(Indre-et-Loire) FRANCULO	En Francujo.....	1 fr. »
	En eksterfrancaj landoj....	1 fr. 50

Pro poŝta eraro, nia manuskripto por la aprila numero ne ĝustatempe alvenis al la presisto. — Ni hodiaŭ eldonas 8 anstataŭ 4 pagojn.

Kelkaj vortoj pri Internaciismo katolika

(de Profesoro Dombrowski, pastro katolika)

« Internaciismo tutmonda aperas sur niaj okuloj... » (1) Ĝi ĉiutage kreskas, evolucas, progresadas. Estas jam internaciismo komerca, vojaĝa, scienca, socialista... Kial do ne povus hodiaŭ aperi ankaŭ *internaciismo kristana* ?

La internaciismo nuntempe sin apogas sur l'ideo pri l'frateco de l'popoloj. Sed tiu ĉi ideo estas ja ideo tute kristana. Tial la internaciismo kristana ne sole povas, sed ankaŭ *devas* hodiaŭ aperi.

La ideo pri l'frateco de l'popoloj, abstrakte prenita, kvankam ĝi trovas multe da anoj, restas ĝis nun vana revo. Tion klare elmontras barbarajoj de l'nuna militarismo kaj diversaj naciaj malamikemoj, pri kiuj ni ĉiutage legas en niaj gazetoj.

Por ke la dirita ideo pri universala frateco de kristanoj popoloj ĉesu esti vana revo kaj komencu efektiviĝadi, ĝi devas esti starigita sur ia fortika principo. Tiu ĉi do principo povas esti nur *la universala fideco kaj fideleco al la komuna Patro de ĉiuj veraj kristanoj*.

Belege tion ĉi elmontris la glora rusa filozofo Wladimiro Ŝoloviev. Jen estas liaj propraj vortoj :

« Por altiĝi al *universala frateco*, nacioj, registaroj, monarkoj unue

(1) Laseu : *Reunion Internacian*, No 3^a, p. 65-68.

devas akcepti la moralan *filecon* de l'Patro komuna... Por atingi l'idealon de l'unueco perfekta, necesas apogi sin sur unueco ne perfekta, sed reala, kaj antaŭ unuiĝi en libereco, kuniĝi en oboe. »

De kio li konkludas: « La vera estonteco de l'homaro, pri kiu ni devas laboradi, estas universala Frateco, naskita de universala Patreco per morala kaj sociala Fileco. » (1)

Tiu ĉi penso de Soloviev, kiun liaj patrujanoj dum lia vivo malkomprenis kaj malbenadis, por ni katolikoj estas tre komprenebla kaj konata. La dezirata de l'ortodoksa filozofo « centro de unueco » en la kristanaro ekzistas en nia eklezio jam de pli ol mil jaroj. Tiu ĉi « centro » kaj « komuna patro » estas roma Papo, heredanto de Sankta Petro, episkopo de ĉiuj episkopoj kaj videbla kapo de nia Eklezio.

Havante en la persono de l'papo unu komunan patron, difinitan de Kristo mem en la persono de l'apostolo Petro, la katolikaj popoloj estas *veraj fratoj en Kristo*. Ilia frateco jam estas ne ia nebula revo, sed tute plenumita fakto. La belegan montriĝon de tiu ĉi fakto ni vidas ekzemple en la nunaj tagoj. El la tuta mondo grandegaj amasoj da diversnaciaj pilgrimantoj veturadas Romon por gratuli nian komunan Patron, Leonon XIII^{an}, festantan jubileon de sia dudekvinjara papado.

Sed estante fratoj kaj havante komunan patron ĉu ni diversnaciaj katolikoj jam atingis idealon de l'universala kristana frateco? Ĉu ni devas nenion plu deziri? La respondo al tiu ĉi demando ŝajnas al ni tre facila: ni devas deziri, ke pli kaj pli unu ceterajn povu komprenadi kaj ke la voĉo de nia komuna patro estu al ni ĉiuj egale komprenebla. Nia katolika Eklezio estas grandega familio: Papo estas patro, la popoloj rilate al Papo filoj, rilate al si mem fratoj. Sed en *unu familio devas esti ankau unu al ĉiuj ĝiaj membroj komprenebla lingvo*. Estus kontraŭnature aŭdi filojn de unu patro dirantaj unu al alia: « mi vin ne komprenas, frato! » Sed bedaŭrinde la dirita kontraŭnatureco ne estas ĝis nun forigita el niaj frataj rilatoj. Ni venas Romon gratuli nian komunan patron kaj rigardas unu aliajn, kiel fremdulojn; ĉar italo ne komprenas francon, franco germanon, germano hispanon, hispano irlandon, irlando polon, k. t. p.

Certe ekzistas en nia Eklezio lingvo latina, komprenebla al ĉiuj katolikaj pastroj. Sed lingvo latina, estante lingvo de pastroj, en la

(1) SOLOVIEV: *L'Idée russe*, Paris 1888, p. 39-40.

nuna tempo jam ne sufiĉas. Papo estas patro ne sole de pastroj (ŝafoj) sed ankaŭ de ĉiuj katolikoj (ŝafidoj), al kiuj estas nemalpli dezirinde, ke la komuna patro alparolu en komune komprenebla lingvo. Tiu ĉi do lingvo, videble ne povas esti itala aŭ franca, aŭ ia alia el vivantaj, sed sola lingvo internacia, kiel la plej alirebla al amasoj, ĉar la plej facila.

En la komenco de l'Eklezio, l'apostoloj, dank'al la supernatura dono de lingvoj, *estis komprenataj de ĉiuj* (Akt. Ap. II, 6-13). Nune tiu ĉi dono ĉesis. Sed la ofico « instrui ĉiujn popolojn » por la heredantoj de la ĉefapŝtolo Petro, daŭradas ĝis nun kaj ĉesos nur en la fino de l'mondo. Tial la Roma Patro, *Apostola super ĉio*, ĉiam bezonos esti *komprenata de ĉiuj*. Por tio li espereble iam ekvolos uzi nian lingvon internacian, kiu ebligus al la komuna Patro kompreni parolon de siaj filoj, al la filoj kompreni sian Patron kaj sin unu ceterajn. — Jen esta la precipa fundamento por la internaciismo katolika.

KRONIKO

Francujo. — Estas jam anoj de E. K. en la sekvantaj urboj: Angers, Autun, Alfortville (Seine), Baracé (Maine-et-Loire), Besançon, Bordeaux, Douai, Epernay, Givry (Saône-et-Loire), Lyon, Nancy, Orléans, Paris, Portsall (Finistère), Rivarennés (Indre-et-Loire), Saint-Brieuc, Saint-Claude (Jura), Soissons, Tours, Vuillafans (Doubs).

Informoj pri E. K. estis ankaŭ petitaj de Marseilles, Chaumont (Haute-Marne), Digoïn (Saône-et-Loire), Epinal, Oran (Algérie), Rueil (Seine-et-Oise), k. c.

Belgiujo. — Novajoj de tiu ĉi lando estas bonegaj. La studentoj de l'Universitato Katolika en Lovano formis provizoran grupon, kies titolo estas: *Esperantista Katolik-Universitata Grupo* (E. K. G.) Ili estas jam ĉirkaŭ 50 grupanoj. Kelkaj profesoroj de l'Universitato estas Honoraj Membroj de E. K. G. Espereble, ili imitos l'Universitatajn profesorojn laikajn kaj baldaŭ igos fervoraj Esperantistoj. »

Hispanujo. — E. K. havas anojn en Madrid, Murcia kaj Valencia. Pastroj katolikaj, en Murcia, promesis eklerni Esperanton post Pasko. Societo de Pastroj instruistoj montris simpatian pri nia afero kaj promesis sin okupi pri ĝi en sia Revuo semajna: *Piedad y Letras*.

Alĝoj ankaŭ venis al E. K. de Anglujo, Bohemujo, Moravujo (Aŭstrujo), Rusujo. Informoj estis petitaj el Azia Rusujo, Roma, Luksemburgo, Anglujo, k. t. p.

Jurnaloj kaj Revuoj. — La francaj ĵurnaloj: *L'Univers*, *Le Peuple Français*, *La Délivrance*, *Le Clairon de l'Ardèche*, *Le Nouvelliste de Lyon*, *Le Messager d'Indre-et-Loire*, publikigis artikolojn, pri Esperanto kaj ĝia taŭgeco por katolikoj, aŭ pri la *Prêgareto*.

La Verdad, eldonita en Murcia (Hispanujo), konigis E. K. al siaj legantoj en sia numero de 16^a de marto.

Revuo Internacia (Bistryce-Hostyn, Moravujo-Aŭstrujo), publikigis la unuan regulon de nia Regularo.

Dankon al esperantistaj gazetoj. — Koran dankon kaj amikan saluton ni sendas al la jenaj Esperantistaj gazetoj *La Lumo* (marto), la *Holanda Pioniro* (marto), kiuj eldonis la tutan Regularon de E. K.; la *Belga Sonorilo* (aprilo), *Lingvo Internacia* (marto kaj aprilo), kiuj afable konigis E. K. je siaj legantoj.

La Verdad (aprilo, 12), eliranta en Murcia (Hispanujo), publikigis tradukon de nia artikolo: *Utiliteco de Esperanto por katolikoj*. — Itala amiko, promesis al ni tradukon de l'sama artikolo, kies reproduton ni ne nur permesas, sed ankoraŭ tutkore konsilas.

Brosuro propaganda. — Kelkaj korespondantoj petis de ni la folion kiun enhavis la aprobon de Lia Ĉefepiskopa Mosto René-François Renou, Ĉefepiskopo en Tours (Tur). Bedaŭrinde, ĉiuj la diritaj folioj estis jam senditaj por la propagando. Sed ni intencas eldoni specialan broŝureton propagandan pri E. K., kaj sur ĝi ni reeldonos la ĉefepiskopan aprobon.

Aliaj anoj de E. K. jam petis de ni tradukon de l'Evangelioj. La propaganda laborado malfacile permesas al ni tuj entrepreni tiun ĉi verkon. Tamen ni tion provas, se ni povos esperi helpon de kelkaj Esperantistoj bonege konantaj nian lingvon.

En nia proksima numero, ni parolos pri projekto de Biografioj de l'gloraj katolikoj en ĉiuj nacioj. Por tio ni petos la kunlaboradon de niaj amikoj.

RELIGIAJ INFORMOJ

Oni legas en la pola revuo ĉiusemajna *Kraj* (Lando) N^o 3^a de 18-31 de januaro:

« Laŭ ordono de Lia Ĉefepiskopa Mosto B. Kłopotowski, la kalendaro de arĥi-eparkio de Mohylow por jaro nuna enhavas sciigojn, plie de kutima ĝia teksto en lingvoj: *rusa, pola, latina, latva kaj germana*, ankoraŭ aldone en lingvoj *litova kaj sveda*... »

Okulvideble *kvin* lingvoj ne sufiĉis, oni decidis aldoni ankoraŭ *du* por atingi *sep* por unu arĥi-eparkio... Kaj certe ne estas, ke tio-ĉi estas fino de la dezirobla plimultigo. Ĉu ne bone taŭgus Esperanto en tiaj okazoj? Ĉu ne estas tre dezireble, ke la Paŝtonto de eparkio, en kiu loĝadas diverslingvaj katolikoj, povu kun ili komunikiĝi kaj al ili paroladi, kiam li, kiel Paŝtonto, vizitas sian ŝafaron?

Ni aliflanke sciigis ke almenaŭ unufoje nia lingvo jam estis uzita en katolika preĝejo, en Smolensk, ĉefurbo de Smolenska gubernio, en Rusujo. Espereble, en baldaŭa estonteco, tio ne estos nur malofa okazoo...

« **Ĉikago.** — Pastro F. J. Barry, publikigis jaran raporton, kiu montras ke l'nombro de katolikoj pligrandigis per 200 miloj da homoj kaj ke la nombro de infanoj, vizitantaj parohajn lernejojn nun estas per 12 miloj pli granda ol antaŭe kaj egalas nun 92 miloj. Entute, arĥi-eparkio de Ĉikago kalkulas nun unu milionon da fideluloj de religio roma-katolika.

« El 370 preĝejoj, oni kalkulas en urbo Ĉikago mem 155. El ili en 71 reĝas lingvo angla; en 34 lingvo germana; en 14 pola; en 10 bohema; en 4 franca; en 5 itala; en 6 slovaka (najbaroj de Moravujanoj); en 6 ĥovata (norda, katolika parto de serboj, loĝantaj en Aŭstrujo); en 2 litova; en 1 greka; en 1 siria; en 1 holanda.

« La plej granda estas paroĥo pola de Sankta Stanislaw Kostka (30,000, da paroĥanoj); sekvas: paroĥo irlanda ĉe preĝejo de Plej Sankta Familio (20,000), kaj germana ĉe preĝejo de Sankta Miĥaelo (25,000). » (*El Kraj*: N^o 1^a, 1903).

Internacia donaco al Lia Papa Mosto Leo XIII. — Centra Komitato formigis en Italujo por prezenti internacian donacon al

Leo XIII^a, okaze de l'fino de Lia Jubileo. — Laŭ sia promeso, la Pariza Komitato, per sia Sekretario Generala, donigis al la Sankta Patro la monon en Francujo kolektitan por la Denaro de Sankta Petro, kune kun la Ora Libro enhavanta la nomojn de la 300 oferintoj. Leo XIII^a sin montris tre kortuŝita pro l'oferdono de la francaj fideluloj katolikaj, intermeze de la gravegaj cirkonstancoj nunaj, kaj li donis al ili ĉiuj sian benadon.

Pri la persekuto en Francujo. — Multaj el niaj fremdaj amikoj petis de ni informojn pri la nuna persekuto. Ni bedaŭrinde ne povas detalojn doni, ĉar ni bezonus por tio pli ol kelkaj paĝoj...

Ni tamen volas konigi la jenojn al niaj fremdaj fratoj : Ĉiuj monaĥoj kaj monaĥinoj estas aŭ baldaŭ estos per forto forpelitaj de iliaj domoj. Oni vendas ĉiujn bienojn de l'religiuloj. Oni fermas katolikajn lernejojn, en kiuj estis religiaj instruistoj aŭ instruistinoj. La leĝoj estas ĉiutage pligravigitaj per simplaj dekretoj de l'Ministro de Kultoj. Ĉiuj ne-parohaj preĝejoj estas fermotaj, kaj de nun multaj el ili estas fermitaj. Oni intencis fermi la grandajn Sanktejojn de Lourdes, Fourvières (Lyon), Sankta Anno (Britanujo franca) ; sed la Ministro ne kuraĝis tion fari pro la decida kontraŭbatalo de la katolikoj.

Nune oni ekatakas la pastraron. Jam malpiuloj eniris preĝejojn dum diservo, interrompis la predikanton, kaŭzis grandan skandalon kaj eĉ vundis fidelulojn jetante kontraŭ ili rompitaĵojn. La poliestro, anstataŭ ol protekti la fidelulojn, silentigis la predikanton !...

Ni petas niajn amikojn konigi tiujn persekutojn per iliaj ĵurnaloj aŭ revuoj kaj energie protesti kontraŭ ili.

ESPERANTO KAJ LINGVO LATINA

Tre gravas neniam perdi, neniam aliformigi la veron religian : tial ĝin enhavu lingvo, kies evolucio finiĝis, kies senco ne povos mal-samiĝi. Tial lingvo latina restadu la lingvo de l'teologio kaj liturgio ; Ĝin ellernu tiuj, kiuj devas serĉi la veron en la Biblio, en la verkoj de l'Sanktaj Patroj, en la decidoj de l'konsilioj ;

Ĝin ellernu riĉuloj instruigemaj, kiuj volas ricevi plezuron, legante mem la tekstojn.

Neniam kontraŭ ili staros *Espero Katolika*.

Sed kiam iu ellernis la lingvon latinan, li, vere, povas, kompreni tion, kion li legas ; li povas latine literaturi, verki pri religiaj temoj ; li tamen ne povas trovi en la malnova idiomato la vortojn bezonatajn por esprimi novajn ideojn, por nomi objektojn hodiaŭ ĉie konatajn, kies ekzistontecon eĉ ne suspektis niaj avoj.

Kiam iu latine parolas kun fremdulo, ambaŭ elparolas malsame, ili ne sin komprenas reciproke.

Per Esperanto povas esprimiĝi ĉiuj ideoj antikvaj aŭ novaj.

Esperanto estas facile lernebla ; sufiĉas koni bone ĝiajn literojn por koni ĝian ortografion ; ĉiuj popoloj ĝin elparolas same. Fariĝu do Esperanto, en ĉiu lando, la oficiala lingvo de l'socialaj kristanoj. Ĝin ellernu, ne sole laikoj, sed ankaŭ monaĥoj, monaĥinoj, ĉiuj eklezianoj ; kaj tial fondiĝos per Esperanto granda federacio internacia de l'katolikaj societoj.

H. A.

PREGO DE FAMILIO KRISTANA

(Tradukis H. A.)

Dio bona kaj kompatema, vian helpon ĉiopovan ni vokas sur nian domon, nian familion, ĉion, kion ni posedas. Nin benu, kiel vi benis la Familion Sanktan en Nazareto.

O Jesuo, elacetiĝinta nin ! pro l'amo, kiu vin igis homiĝi por savi nin, pro l'kompatemo, kiu vin igis morti por ni sur kruco, nian domon, nian familion benu.

Liberigu nin de la malbono kaj de l'insidoj de homoj ; dekliniu de ni tondron, hajlon, fajron, superakvon, malbelan veteron.

Ne koleru al ni : malproksimigu de ni malamon de malamikoj, malsanon kaj militon. Ne permesu, ke ni mortu sen sakramentoj.

Nin benu, por ke ni tortike konfesu nian sanktigantan kredon, por ke meze de suferoj kaj malĝojoj, nian esperon ni konservu, por ke ni duobligu nian amon al vi kaj al niaj proksimuloj.

O Jesuo, nin benu, nin defendu.

O Mario, patrino de favoro kaj de kompatemo, benu nin ; venku spiritojn malbonajn, kiuj nin turmentas ; konduku nin per via patrina

mano tra tiu ĉi valo de larmoj; preĝu por ni vian filon, li igu nin meriti plenumon de liaj promesoj!

Sankta Josefo, patra nutrinto de nia Savinto, protektinto de l'Virgulinino Sankta, per viaj preĝoj ni ricevu benadon en nia loĝejo.

Sankta Miĥaelo, defendu nin, kiam al ni minacas infero.

Sankta Gabrielo, igu nin koni la volon de Dio.

Sankta Rafaelo, helpu nin kontraŭ malsano kaj morto.

Sanktaj anĝeloj, kiuj nin gardas, nin tenu nokte kaj tage sur la vojo al la paradizo.

Sanktaj patronoj, preparu nian iron al Dio.

Jes, benu loĝejon nian, Vi, Dio Patro, kiu nin kreis; Vi, Dio Filo, kiu por ni suferadis kaj mortis sur kruco; Vi, Dio Sankta Spirito, kiu sanktigis nin per la akvo de l'bapto.

Tre Sankta Triunuo, daurigu sana nian korpon, purigu nian animon, gvidu nian koron, konduku nin al la vivo eterna.

Glor'al Patro, glor'al Filo, glor'al Sankta Spirito. Amen.

AVIZOJ GRAVAJ

1°. Ni deziras havi Helpantojn almenaŭ en ĉiuj episkopujoj. Tial ni ajn estas petitaj proponi al ni personojn eblajn akcepti tiun ĉi oficon.

2°. La traduko kaj reprodukto de l'artikolo: *Utileco de Esperanto por katolikoj* estas entute permesita kaj ĉi rekomendita. Ĝin eldonu niaj amikoj en siaj naciaj ĵurnaloj aŭ revuoj.

3°. Ĝion pri l'abonoj kaj pri la redakcio oni sendu al S^o Pastro **Em. Peltier**, en *Cheillé*, per *Azay-le-Rideau* (*Indre-et-Loire*), Francujo.

BIBLIOGRAFIO

L'Esperanto en dix leçons, par Th. CART et M. PAGNIER. — Prix: 0 fr. 75 (Ces divers ouvrages sont édités par la librairie Hachette, 79, boulevard Saint-Germain, Paris).

Preĝareto por Katolikoj, par L. DE BEAUFONT. — Prix: 0 fr. 75 (franco), Paris, Poussielgue, rue Cassette, 15.

Junio. 4

ESPERO KATOLIKA

Societo por la vastigado de l'lingvo Esperanto inter la katolikoj

FONDAVINTO-DIREKTORO : Abalo Em. PELTIER	Jara kotizaĵo por E. K. ...	2 fr. »
en CHEILLÉ, per AZAY-LE-RIDEAU	ABONKOSTO JARA POR LA REVUO :	
(Indre-et-Loire) FRANCULO	En Francujo.....	1 fr. »
	En eksterfrancaj landoj....	1 fr. 50

Por la redakcio kaj administracio de E. K. sin turni nur al la Direktoro.

KATOLIKAJ VERKOJ EN ESPERANTO

La disvastigo de Esperanto inter katolikoj estus multe pli facila, se ni povus prezenti al la katolikaro librojn katolikajn en Esperanto.

Nune, multaj katolikoj ne ekvidas la tujan utilecon de l'lingvo internacia. Tiu ĉi utileco klare aperus, se estus eldonataj verkoj kapablaj interesi la katolikaron.

Tial ni klopodos formi *Bibliotekon de Espero Katolika*. Ni unue entreprenos tradukon de l'Evangelioj. Jam de nun du pastroj komencis la laboron tradukante S^{an} Mateon kaj S^{an} Johanon.

Nature ĉi tiuj tradukoj estos verkataj laŭ la originalaj tekstoj, kaj klarigataj per notetoj. Ili poste utilis por la eldono de plenaj komentarioj pri la Nova Testamento.

Kune kun la eldono de *tradukoj*, ni deziras instigi la produktadon de *originalaj* verkoj. Ni do proponas al ĉiuj katolikaj esperantistoj verki kolekton da *Biografioj de l'gloraj ĉiunaciaj katolikoj*.

Tiuj ĉi Biografioj estus nur mallongaj broŝuroj da 32 paĝoj, facile legeblaj kaj aĉeteblaj.

Jam ano de E. K. promesis verki Biografion de Lia Rapa Moŝto Leo XIII^a.

Ni plezure ricevos la proponojn de l'verkistoj kaj kun ili korespondados pri la kondiĉoj ordigotaj.

Pastro Em. PELTIER.

ESPERANTO EN KATOLIKA PREĜEJO

En nia lasta numero ni raportis, ke Esperanto jam estis uzita en Katolika preĝejo, en Smolensk (Rusujo). Pri tio ni skribis al S-ro Pastro Dombrowski, kiu afable al ni konigis la jenajn detalojn:

« ... Tio ĉi okazis (se mi ne eraras) en jaro 1896. Oni festadis tiam la apiron de Diservo en la nove konstruita katolika preĝejo en Smolensk. Nature tiaj katolikoj volis fari tiun ĉi feston plej eble solenan. Ĉe tiu ĉi okazo Smolenskaj esperantistoj ekdeziris ankaŭ ekmontri siajn religiajn sentojn. Tial, preninte el la Beaufronta « Preĝareto » mian poezion: « Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj », verkigis muzikon por ĝi kaj trakanis ĝin ĥore dum la meso en la supredirita solena tago.

« Pri tio ĉi, *post la fakto*, sciigis min unu el Smolenskaj esperantistoj, S-ro Zakrejški. Se mi sciis antaŭe pri la deziro de Smolenskaj esperantistoj ekkanti ion Esperante en la preĝejo, mi eble verkus alian pli konvenan religian himnon por tiu ĉi okazo....

« Tamen mi ne estas tro ĉagrenita de tiu ĉi Smolenska incidento. Ĝi ja elmontris al mi, ke religiaj kantoj en Esperanto ne estas ia monstraĵo aŭ profanacio de la religio mem. Kontraŭe mi ekvidis, ke ili iam povas trovi uzeblecon en la Katolika vivo.

« Nune do mi iras plue kaj kuragas eĉ proponi: ĉi vi ne povus anonci konkurson pri bonaj religiaj kantoj tradukindaj aŭ eĉ en Esperanto originale verkataj?

« Ni katolikoj havas jam *Preĝareton*. Sed ĝi estas neplena kaj devas esti alplenigita per *Kantareto por Katolikoj*. Kaj mi esperas, ke la dirita konkurso alportos al vi ne unu vere belan kaj vere religian himnon, kanteblan eĉ en la preĝejoj. »

Ni plezurege akceptas la ideon de konkurso pri religiaj kantoj. Ni invitas niajn legantojn esprimi al ni ilian opinion pri tiu ĉi projekto kaj pri la kondiĉoj de l'konkurso. La respondojn ricevitajn ni raportos en nia Julia numero.

Em. P.

KRONIKO

Lovano (Belgujo). — La *Esperantista Katolik-Universitata Grupo* denove kunvenis la 12^{an} de majo. AL la kunveno ĉeestis profesoroj de l'Universitato, Honoraj Membroj de l'Grupo. So Félix de Roy, redaktoro de *La Metropole* (Anversa ĵurnalo), faris paroladon pri Esperanto.

Plenan sukceson al la katolikaj studentoj! — Kredeble ili estos baldaŭ sekvataj de la Parizaj kaj Friburgaj katolikaj studentoj.

Saint-Claude (Jura). — So Jean Mistler, Direktoro de libera dua-grada Lernejo organizis kursojn pri Esperanto por siaj lernantoj. Espreble baldaŭ fondiĝos Klubo de E. K. en St-Claude.

Hispanujo. — Bonegaj novaĵoj alvenis al ni de Murcia. *La Verdad*, ĉiusemajne publikigas sciigojn pri Esperanto. Ĝi laste eldonis esperantan tekston de « Patro Nia ». Sagace la presisto aŭstataŭis la literojn sursignitajn per pli nigraj literoj.

En Valencia, serioza movado aperis favora al Esperanto inter Katolikoj. *Piedad y Letras*, semajna revuo eldonita de pastroj de l'*Piaĵ Lernejoj*, simpatie parolis pri nia afero.

Italujo. — *Il Diritto Cattolico* (26^{an} de majo) eldonita en moderna, plenan italan tradukon publikigis de nia artikolo: *Utileco de Esperanto por Katolikoj*, kun sciigojn pri nia revuo kaj societo.

En Riolunato espereble fondiĝos klubo de E. K.

Ĵurnaloj kaj Revuoj. — *La Lumo* (aprila), kun varma aprobo publikigis la artikolon francan de S^o J. Sarda, el la februaro n^o de l'*Aube*.

L'*Esperantista*, organo de l'Itala s. p. p. E., bonegan resumon eldonis de l'artikolo *Utileco*, k. c.

La Holando Pioniro saman artikolon entute eldonis en Esperanto kaj tial daŭrigas sian afablan propagandon por E. K.

Rondiranto, organo de la Bulgaraj Esperantistoj, konigis E. K. al siaj legantoj. Bedaŭrinde la adreso de S^o Bréon estis donita aŭstataŭ ĉi tiu de l'Direktoro de E. K. — Certe tiun eraron *Rondiranto* korektos en sia proksima n^o.

Avizo. — *Pri l'manko de spaco, ni ne povas hodiaŭ eldoni artikolojn pri Religiajn Informoj*.

KATOLIKAJ PREĜOJ

Veni Sancte Spiritus

v. Venu, Sankta Spirito.

r. Plenigu la korojn de viaj fideluloj, kaj de amo via en ili ekbruligu la fajron.

v. Sendu vian spiriton, kaj ĉio estos kreata.
r. Kaj vi renovigos la supraĵon de l'tero.

HI PRĜU

Dio, kiu la korojn de l'ĝdeluloj per la lumo de l'Sankta Spirito instruis, donu al ni en tiu sama Spirito sati la bonon, kaj ĉiam de ĝia konsolo ĝoji. Per Kriŝto, Sinjoro nia. Amen. (*Tradukis H. A.*)

Memorare

Vi memoru, tre pia Virgolino Mario, ke neniam oni diris en la mondo ke tu, al via defendo sin turninta, petinta vian helpon kaj alvokinta viajn preĝojn, estis malzorgata. Mi do, animata per tia konfido, al vi venas; al vi, Virgolino el la Virgulinioj, mia Patrino, mi kuras; antaŭ vi jen mi estas ploranta pekulo. Vi, patrino de l'Vorto, ne malatentu miajn preĝojn, sed favore aŭskultu ilin kaj Konsentu. Amen.
(*Tradukis P. D. Hugon.*)

Sub Tuum Præsidium

Al via protekto ni alkuras, sankta Dipatrino; niajn preĝojn ne malatentu en la necesoj; sed ĉiam liberigu nin de ĉiuj danĝeroj, Virgolino glora kaj benata. Amen.
(*Tradukis P. D. Hugon.*)

Penso

Ni celas plezuron.

Ĉu ni ĝin trafos per malvirto aŭ per virto? Malvirto naskas plezuron momentan, fluan, kadukan, iluzion; kaŭzas poste nevolitajn maldorimojn, fastojn, laborojn, ŝvitojn, sangon, malfortecon, tiel malfacile yenkeblajn pasiojn, tiel pezan satecon, ke ĝi pli doloras ol pentofaro, kaj igas nin timi morton.

Virto ne havas saman sekvon.

Al multaj homoj virto ŝajnas malafabla, neproksimigebla; laŭ multaj aliaj, se virto kondukas al plezuro, la vojo al tiu plezuro estas malebena, krutega, laciga; tiuj homoj ne konas virton:

Malfacileco iri al vera plezuro ne venas de virto, sed de malforteco, kiu sekvas kutimon malvirte konduti.

Tiuj homoj memorigas la vulpon de l'fablo, kiu, ne povinte atingi vinberojn tro alte kreskintajn, foriris dirante: « Ili ne maturaj, kaj bonaj nur por fuŝistoj ».

H. A.